



## KIEL IĜI AKADEMIANO!

Kiel fariĝi Kandidato al posteno en la Akademio de Esperanto? Por fariĝi Kandidato al la Akademio, Esperantisto devas plenumi plurajn kondiĉojn. La plej multaj rezultas el du artikoloj de la Statuto. Unu rezultas el la praktiko kaj tradicio.

Tiuj kondiĉoj estas jenaj:

El la artikolo 8:

1. Li/Ŝi devas esti proponita de almenaŭ kvin Akademianoj.
2. Tiuj kvin Akademianoj devas reprezenti almenaŭ tri malsamajn lingvojn.

El la praktiko kaj tradicio:

3. La Kandidato sendu al iu Estrarano (precipe al la Prezidanto) leteron, en kiu li deklaras esti Kandidato. *(Pli ol unu fojon montriĝis, ke iu ŝatata amiko ricevis la necesajn subtenojn, sed tamen poste ne deziris partopreni en niaj laboroj kaj nete rifuzis la kandidatiĝon proponitan tiel afable. Tio estas agrabla por neniu!)*

El la artikolo 9:

4. En la sama letero li deklaru, ke li estas "fidela al la Fundamento" kaj konsentas "konstante kunlabori en la Akademio".

Kiam iu Esperantisto plenumis tiujn kvar kondiĉojn, li fakte transiris la unuan etapon por esti efektiva Kandidato. Sed nenio urĝas: la limo estas la 31-a de Decembro antaŭ la elekto-jaro, post kiu dato nenio plu povas kandidatiĝi. Tamen ni kutime ne atendas la unuajn kandidatiĝojn antaŭ la 1-a de Oktobro; ĝis tiam la

alvenintaj kandidatiĝoj provizore dormos en dosiero ĉe nia Sekretario. *(Estas konsilinde sendi la tutan dosieron en unu fojo: 5 konformaj kandidatiĝoj, plus unu deklaro; ne utilas aldoni ion alian!)*

*Ekde la 1-a de Oktobro antaŭ la elekto-jaro la Sekretario sendos demandaron al ĉiu Esperantisto, kiu sendis kompletan dosieron. En la komenco de Oktobro li sendos alian demandaron al la Kolegoj de la Eliranta Triono. Ĉiuj demandaroj devos reveni al li plej malfrue la 31-an de Decembro. Ĉiuj respondintoj ekde tiam fariĝos Kandidatoj por la elekto: iuj estos novaj Kandidatoj, aliaj estos niaj reelekteblaj Kolegoj (artikolo 4).*

En taŭga tempo speciala Akademia Ĉirkulero konigos la nomojn de la Kandidatoj kaj prezentos la respondojn de la Kandidatoj al la demandaroj. *(Pro tio necesas, ke la materia prezento de tiuj respondoj estas kiel eble plej bona: la Sekretario nur kopios, kion oni sendos al li!)*

Iom pli poste la deĵorantaj Akademianoj de la tri Trionoj estos invititaj al sekreta baloto.

*Aliparte estus bone, ke ĉiu deziranta fariĝi Kandidato havigu al si la tekston de la pli fruaj Akademijaj decidoj (almenaŭ la Aktoj de la Akademio I, II kaj III) kaj ankaŭ la lastan redakton de la Statuto de la Akademio: ĝi troviĝas en Aktoj III, sed ĝi estas ankaŭ aparte havebla ĉe la Sekretario).*

Reta publikigo de "Aktoj de la Akademio, III, 1975 - 1991 (Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, N° 11)"

3

## TRIONO ELEKTITA

Elekto de triono de akademianoj. Okazis en la unuaj monatoj de 2010, la reelekto de triono de la akademianoj laŭ la Statuto de la Akademio de Esperanto.

Ne rekandidatis Aŝvinikumar, Gersi Alfredo Bays, André Cherpillod, Flavio Rebelo kaj Trevor Steele.

Iliajn lokojn prenis la novaj akademianoj Marcos Cramer, Lena Karpunina, Stano Marĉek, Paŭlo Moĵajev kaj Alexander Shlafer.

Estis reelektitaj Vilmos Benczik, Probal Dasgupta, Miguel Gutierrez Aduriz, Boris Kolker, Erich-Dieter Krause, Li Shijun, Carlo Minnaja, Humphrey Tonkin, Bertilo Wennergren, Yamasaki Seikô.

Pro la ĵus okazinta forpaso de akademiano Maŭro La Torre, nun la Akademio konsistas el 44 membroj: Perla Ari Martinelli, Marc Bavant, Vilmos Benczik, Gerrit Berveling, Marjorie Boulton, Renato Corsetti, Marcos Cramer, Dao Anh Kha, Probal Dasgupta, Michel Duc Goninaz, Lena Karpunina, Gbeglo Koffi, Paul Gubbins, Miguel Gutierrez Aduriz, Otto Haszpra, Christer Kiselman, Boris Kolker, Ilona Koutny, Katalin Kovats, Erich-Dieter Krause, Li Shijun, Jouko Lindstedt, François Lo Jacomo, Anna Lowenstein, Ma Young-tae, Carmel Mallia, Stano Marĉek, Geraldo Mattos Gomes dos Santos, Carlo Minnaja, Paŭlo Moĵajev, Brian Moon, Barbara Pietrzak, Sergio Pokrovskij, Otto Prytz,

4

Baldur Ragnarsson, Francisko Simonnet, Alexander Shlafer, Saka Tadas, Humphrey Tonkin, Amri Wandel, John Wells, Bertilo Wennergren, Xie Jü-ming, Yamasaki Seikô.

La estraro de la Akademio de Esperanto  
Laŭ: Oficialaj Informoj de AdE, n-ro 13, 2010-04-29

## DILBECK & LEUVEN

En Dilbeek, kultura centro "Westland", je la tria etaĝo, ni kunvenas principe ĉiun lastan sabaton de la monato, de la 14a ĝis la 16a. Respondeca Emile Vandamme. Oni eniras tute libere, tamen la unuan fojon pli bone anonci vin, ĉar ni nuntempe nur estas kvinope. Pli da informoj mi volas doni telefone : 054 33 01 51. La Lovena "Esperanto 3000" kunvenas unu fojon monate, kun siaj "Vesperoj 3000", kutime en la Kulturcentro "Romaanse Poort", Brusselsestraat 63, 3000 Leuven. Tien oni eniras tute libere! Vidu <http://esperanto3000.be>, aŭ kontaktu Marc Vanden Bempt.

Lydia Buyst, [lydia.buyst@scarlet.be](mailto:lydia.buyst@scarlet.be)

## FAJRA ROMANO

Verkisto demandas sian eldoniston:

- Ĉu mi metu pli da fajro en la romanon?
- Vi miskomprenis min, metu la romanon en la fajron!

## KIO ESTAS PORKIDO?

La knabo ludis en la korto kaj estis tre malpura. Lia patro diris: "Mia filo, vi estas porkido! Ĉu vi scias, kio ĝi estas?"

"Jes", - respondis la knabo anĝele naiva, - "porkido estas filo de porko."

## Poemaro :

### SONETO

Escrito está en mi alma vuestro gesto,  
y cuanto yo escribir de vos deseo  
vos sola lo escribisteis, yo lo leo  
tan sólo, que aún de vos me guardo en esto.

En esto estoy y estaré siempre puesto;  
que aunque no cabe en mi cuanto en vos veo,  
de tanto bien lo que no entiendo creo,  
tomando ya la fe por presupuesto.

Yo no nascí sino para querereros;  
mi mal os ha cortado a su medida;  
por hábito del alma misma os quiero.

Cuanto tengo confieso yo deberos;  
por vos nascí, por vos tengo la vida,  
por vos he de morir, y por vos muero...

Garsilaso de la Vega (1503-1536)

### TRADUKO

Viaj ĉarmoj ĉe mi skribitaj restas,  
kaj, se verki pri vi dezir' min regas,  
vi sola verkas, verkon mi nur legas,  
ĉar eĉ en tio mi timema estas.

Mia vol' pri vi ĉiam manifestas,  
ĉar, kvankam vido vin ne plene vidas,  
pri viaj bonoj mi senvide fidas  
kaj al mi veron nura ŝajn' atestas.

Mi admiras nur vin, nur vi min ravas;  
mia malbon' nur vin ĉiam deziras;  
en la animo ĉiam mi vin portas.

Mi ja ŝuldas al vi, kion mi havas;  
pro vi naskiĝis mi, pro vi mi spiras,  
pro vi mi devas morti, kaj mi mortas...

Tradukisto nekonata

5

### AŬTUNO

#### (Al la folioj de nia saliko)

La rompeblaj folietoj de nia  
saliko, mortigās en la ĝardeno;  
mi, en ĉi tiu aŭtuna mateno,  
plendas pro tia morto-agonia.

Estas vere teruro-tragedia  
rigardi kiel, per doloro-pleno,  
defalas al la ĝardena areno  
ŝvetante, la vivo arbo folia.

Ritme, puŝitaj de la blova vento  
flugas kiel vunditaj papilioj,  
per funebra danco al l' mortsilento,

falante arbsukojn de energioj  
en l' sekaj branĉoj de dolora sento  
kie, naskiĝos novaj verdfolioj!

Alberto Garcia Orive, novembro 2010,  
Bilbao, Hispanujo

### SONETO

Ĉu vi ne amas al piano veni  
en forlasita ĉambro posttagmeze  
kaj stulte enpenŝiĝi, mallert-peze  
per unu fingro klavojn trapromeni?

Domaĝe, muziknotojn mi ne konas,  
nur palpas mi sur nigro kaj sur blanko,  
tiam mi tamen estas muzikanto,  
muzikojn nefineblajn mi komponas.

Feinoj el la kordoj nun respondas,  
memor' de mond' revata min traondas,  
plezur' krepuska, trist' lontana ploras,

vortruboj de volupto senkonscia,  
songata ŝrik' de l' nokto agonie,  
ĉio. La mondo. Diri mi ne povas.

Ernö Szép (1884 - 1953) hungara poeto  
Tradukis K. Kalocsay

6

### ARABA NOVELETO 20

Abu Bakro bin Muhammado bin  
Abdi-l-Bakijo sciigis min, laŭ kion  
rakontis al li Abu-l-Kasim Ali bin  
al-Muhassino, ke ties patro estis  
dirinta :

Estis raportite al mi, ke Al-  
Mutadido iam sidante rigardadis la  
laboristojn konstruantajn al li  
domon. Li rimarkis inter ili junan  
sklavon, nigrulon, kun malagraba  
eksteraĵo kaj inklino al akra  
petolado, kiu suriradis la ŝtuparon  
po du ŝtupoj kurpaŝe kaj portadis  
duoble pli ol kiom la aliaj portadis.  
Li ne ŝatis lian aferon. Li venigis  
lin kaj demandis al li la kialon de  
tiaĵo. Li ekbalbutis. La ĥalifato  
[kalifo] poste demandis al Ibnu  
Hamdun [kunmanĝanto de la  
ĥalifato. La anoj de la familio  
Hamdun estis ĥalifatecaj  
kunmanĝantoj de patro al filo  
dumlonge], kiu ĉeestis la okazon :  
« Kion deduktas vi pri lia afero ? »  
Li respondis : « Kiu estas li por ke  
vi deturnu viajn pensojn al li ?  
Verŝajne, li ne vivtenas familion,  
el kio lia malplenkapuleco. » La  
ĥalifato replikis : « Ve al vi ! Mi  
ĵus eltiris konjekton el lia afero,  
kiun mi ne konsideras absurda. Aŭ  
li posedas monsumon, kiun li  
malhoneste unufoje akiris, aŭ li  
estas ŝtelisto kamuflanta sin per  
ŝajnoj de masonisto ». Ibnu  
Hamdun kverelis kontraŭ li pro tia  
konjekto. Tiam, ordonis Al-  
Mutadido : « Realkonduku al mi la  
nigrulon ! ». Kio estis farita. Li  
diris : « La vipojn ! » Li donigis al

la nigrulo ĉirkaŭ centon da  
vipobatoj, kaj, por instigi lin al  
konfeso, ĵuris, ke se li ne diros la  
veron, li tranĉigos al li la kolon. Li  
alportigis spadon kaj la ledan  
tapiŝon sur kiu estas ekzekutitaj la  
kondamnintoj. Diris tiam la  
nigrulo : « Ĉu mi estos favorita per  
indulgo ? ». « Ni favoros vin per  
indulgo - respondis la ĥalifato -,  
krom pri kio koncernas eblan  
punindaĵon laŭ juĝa decido. » La  
nigrulo miskomprenis la  
respondon, ĉar li kredis , ke la  
indulgo estis ĵus promesita al li. Li  
diris : « Mi estis dumlonge  
laboristo ĉe brikfornarejo. Antaŭ  
kelkaj monatoj, mi estis sidanta tie,  
kiam pasis preter mi ulo portanta  
ĉirkaŭtalie himijan-on [zono aŭ  
maldika saketo portata ĉirkaŭtalie,  
en kiu oni konservas dinarojn]. Mi  
sekvis lin kiam li alproksimiĝis al  
unu el la brikfornoj kaj sidiĝis  
apud ĝi, sen konsciigi mian  
ĉeeston. Malliginte la himiajn, li  
eltiris el ĝi dinaron. Pririgardante  
lin, mi sciigis, ke li estas plen-  
plena je dinaroj. Mi sturmis lin,  
ŝnuris lin, kaj ŝtopis lian buŝon.  
Poste, mi forkaptis lian himijanon,  
portis lin surŝultre, kaj enĵetis lin  
en la truon de la brikforno, kiun mi  
ŝtopis per argilo. Poste, kiam tio  
finiĝis, mi eltiris liajn ostojn kaj  
forĵetis ilin en la Diĝlato [Tigriso].  
La dinaroj restas kun mi, kio  
fortikigas mian koron. » Al-  
Mutadido ordonis, ke oni iru al lia  
hejmo kaj revene kunportu la  
monsumon. Kaj jen sur la himijaĵo  
afiŝeto jene vortigita : « Ĝi

apartenas al Tia-Tia bin Tia-Tia. » Oni kriigis lian nomon en lia vilaĝo, kaj tiam ekaperis virino diranta : « Tiu estas mia edzo, kaj mi havas ĉi tiun infanon de li. Li foriris en tia-tia dato, portanta himijanon kun mil dinaroj ene. Kaj li malaperis ĝisdate. » La ĥalifato transdonis al ŝi la dinarojn, ordonante al ŝi, ke ŝi observu la laŭleĝan abstinadon [temas pri periodo dum kiu vidvinoj aŭ eksedzinoj ne povas reedziĝi nek sekskuniĝi, por eviti ĉian konfuzon pri patreco]. Li tranĉigis la kolon al la nigrulo kaj ordonis, ke liaj restaĵoj estu ĵetitaj en brikforon.

ibnu al-Gaŭzijo, Libro de la inteligentuloj.  
Jacob Hasbun elarabigis

### ESPERANTA SEMAJNO

La 18-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo okazis en la kataluna urbeto Coma-Ruga (katalune) aŭ Comarruga (hispane) situanta ĉe la marbordo sude de Barcelono, proksime al Tarragona. Ni ĝuis la kunestadon en la bela tristela hotelo “Natura Park”, kie okazis ĉiuj programeroj. En la hotelo estis bonaj kondiĉoj por la laboro kaj la posttagmanĝa ripozo. La aranĝo komenciĝis sabate la 2-an de oktobro kaj daŭris ĝis la sekva sabato, la 9-a de oktobro kun partopreno de 131 geesperantistoj el 11 landoj. La plej foraj venis el Koreio.

En la solena inaŭguro ĉeestis s-ro Raŭl Buira Subiratsal, la vicurbestro de la urbo El Vendrell, al kiu Coma-Ruga apartenas. Post

la bonvenigaj vortoj de la organizantoj li oficiale malfermis la Semajnon esperantlingve.



La urbestro de El Vendrell s-ro Benet Jané i Palau dediĉis al ni tempon kaj vendrede ĉeestis la solenan malkovron de memortabulo sur la muro de la urbodomo. Li montriĝis tre favora al la disvastigo de Esperanto.

Ĉi-foje ni havis honoron aŭskulti prelegojn de renomaj esperantistoj: Gian Carlo Fighiera konatigis nin kun kelkaj noveloj de Boccaccio kaj prezentis japanan filmon “Rashomon”, Renato Corsetti prelegis pri la temo: “Por ke la lingvo estu tutmonda ne sufiĉas paroli ĝin Eŭrope”, Anna Löwenstein prezentis per interesaj bildoj la temon: “Romo antaŭ 2000 jaroj”.

Antonio Marco Botella prelegis kaj prezentis poezian verkon de la granda hispana poeto Miguel Hernández okaze de lia 100-jara datreveno. Inter aliaj programeroj estis interesa prelego pri Belgio akompanata de projekciado fare de la belga geedza paro Michèle kaj Hubert. Geedzoj el Koreio parolis pri la solidareco pere de Esperanto montrante multajn bildojn pri sia agado favore al tio. La edzino, folklore vestita en tipa korea vestaĵo, kantis kaj dancis por ni. Wolfgang Gunther parolis pri sia hobbio “Kiosko de Levante”.

Kiel kutime, ankaŭ ĉi-jare estis aljuĝita la premio “Ada Sikorska-Fighiera” por honori meritplenajn personojn. Ĉi-foje ĝin ricevis la hispana juristino María Rafaela Urueña Alvarez pro sia multjara poresperanta laboro. Menciindas ankaŭ ĉiutaga intensa E-kurso por komencantoj de Stano Marček el Slovakio, kiun kun entuziasmo frekventis dekoj da ĉeestantoj. Interesis programeroj bazitaj sur diskutoj, en kiuj la partoprenantoj povis interveni kaj doni siajn opiniojn. Luis Serrano Pérez ĉi-foje lanĉis debaton pri la temo: “Kio pri la Esperanta gramatiko, ĉu vi realigus modifojn?” Unuanime oni konsentis, ke tio ne necesas.

La vesperojn ni pasigis en agrabla kaj amika etoso kun du interkonatiĝoj. Ni ankaŭ spektis projekciitan operon “La Bohème”, ĝuis allogan dancvesperon en akompano de la jam tradicia muzikensemblo “Montjuic”, kiu

por ni ludis kubajn “Habaneras”. Ne mankis ankaŭ la jam tradicia kaj bongusta “Cremat” - trinkaĵo pretigita kun spicita kaj bruligita rumo verŝita en specialajn memoraĵ-ujetojn. La loka televido intervjuis la ĉeforganizanton, s-ron Luis Serrano Pérez, kaj plurfoje ni estis filmitaj.

Dum la unua duontaga ekskurso ni vizitis la proksiman domon kaj muzeon “Pau Casals” en San Salvador. Tie ni konatiĝis kun la vivo de la majstra violonĉelisto, komponisto kaj bonega orkestro-dirigento, la mondfame konata Pau Casals. Poste ni aŭskultis piankoncerton prezentitan de Jordi Pell Soldevila. Dum la dua duontaga ekskurso ni vizitis la urbon El Vendrell, kie ni partoprenis la inaŭguron de marmortabulo memore al nia Semajno. Ni ankaŭ vizitis la fondaĵon “Apel-les Fenosa” kaj konatiĝis kun ties skulptisto. La tuttaga ekskurso gvidis nin al la fama kaj tre vizitata loko: “Monaĥejo Monserrat”.

Suprenirinte la monton ni havis belegan superrigardon al la vasta ĉirkaŭaĵo. Revene ni haltis kaj vizitis la vinkelon “Cooperativa Agrícola” en Vila-Rodona kaj fotiĝis en la strato Esperanto.

La Semajno finiĝis per interŝanĝo de opinioj pri la Semajno. La partoprenantoj estis kontentaj, oni nur atentigis la organizantojn pri kelkaj aldonaj deziroj. La aranĝo estis kiel kutime gaja kaj agrabla, eĉ la vetero favoris nin. La suno

tutsemajne brilis kaj akompanis nin. Kordankoj apartenas al la tri ĉefaj organizantoj: Luis Serrano, Salvador Aragaj kaj Santiago Torné kaj ankaŭ al iliaj helpantoj. Ni ĝojatendas la venontjaran aŭtunan Esperanto-Semajnon.

Liba Gabalda, Francujo

### RONDETO "AMIKECO"

La 50a Jubileo de la E-rondeto "Amikeco" okazis en la urbo Česká Třebová kiu situas en Ĉeĥio je 160 km de Prago kaj 90 km de Brno. Ĝi havas iom pli ol 16 000 enloĝantojn kaj estas konata kiel urbo de fervojistoj pro la grava fervojstacio pri kiu oni fieras. Tri esperantistoj-fervojistoj Jindřich Štancl, František Jindra kaj Jiří Pištora gvidis tie Esperanto-kurson. Ekde tiam la intereso pri Esperanto kreskis kaj oni fondis la rondeton "Amikeco". Ĝiaj membroj aktivigas organizante diversajn aranĝojn. Renomaj estis baloj por nefumantoj kaj jarfine oni regule okazigas Silvestrajn vesperojn dum kiuj ĉiuj bone amuziĝas kaj bonvenigas Novan Jaron. Menciindas, ke la esperantistoj ĝis nun renkontiĝadas kun najbaraj kluboj por komunaj ekskursoj. Kvin kronikoj atestas pri ĉiuj tiuj aktivajoj. La jubileon de la 50-a jariĝo festis la rondeto "Amikeco" de la 17-a ĝis la 19-a de septembro 2010.

La eventon partoprenis 115 geesperantistoj el pluraj ĉeĥaj

urboj, inter kiuj 15 eksterlandanoj el 5 landoj: Aŭstrio, Danio, Francio, Germanio kaj Nederlando.



50-a jubileo de la Esperanto-rondeto "Amikeco"

ČESKÁ TŘEBOVÁ - ČEĤIO

17 - 19 septembro 2010

Fotoj kaj aranĝoj: Liba kaj Florad Galbalda

La festado komenciĝis vendrede en la Kultura centro de la urbo per seminario "Rolo de Esperanto en moderna mondo". Estis pritraktita serio da prelegoj pri la historio de Esperanto kaj la nuntempa E-movado en la mondo. Oni parolis pri la E-rondeto "Amikeco", pri la fervojista movado en la mondo kaj la aplikado de Esperanto en faka terminologio. Prelegis ĉeĥaj kaj eksterlandaj esperantistoj. La solenan inaŭguron ĉeestis la vicurbestrino kaj la estrino de la loka muzeo. La okazaĵon filmis la loka televido OIK. Vespere oni diskutis kaj babilis en la apuda kafejo "Esperanto".

La solena programo estis

10

antaŭvidita sabate. Matene ni amasiĝis en la urba parko "Javorka", kie post la festparolado estis malkovrita memorŝtono okaze de la 50-a jubileo. Post la komuna fotado ĉe ĝi ni translokiĝis al la restoracio "Hory", kie per tostado de ŝaŭmvino komenciĝis la solenaĵo. Sekvis bonvenigaj vortoj fare de Jana Křížková kaj Ladislav Kovář. Oni legis salutojn kaj bondezirojn venintajn el pluraj landoj. Ankaŭ surlokaj reprezentantoj de la menciitaj landoj salutis la ĉeestantaron. Meritplenaj personoj de la klubo ricevis diplomon pro sia longjara laboro en la rondeto "Amikeco". Oni projekciis filmitan resumon pri la okazintaĵoj kaj la aktivado dum la 50-a ekzisto de la klubo. Post bonega tagmanĝo ni komune promenis en la ĉirkaŭaĵo kaj vizitis apudan kapeleton, aŭskultis orgenon kaj kantis. Vespere la muzikistoj ludis konatajn nostalgiajn melodiojn por ĝojigi la ĉeestantaron kaj invitis al dancado. Ne mankis riĉa tombolo en kiu ĉiu gajninto trovis ion por sia gusto. Dimanĉe okazis komputila seminario pri Esperanto. Promenon tra la urbo ni komencis ĉe la stacidomo. La 15-an de septembro 2010 oni tie inaŭguris modernan multifunkcian trafikterminalon kun nova busstacio. En la Kultura centro ni spektis ekspozicion pri la projekto kaj konstruado de tiu-ĉi impona konstruaĵo. Sekvis vizito ĉe la Malnova placo kaj apuda preĝejo. Laste ni atingis la plej

malnovan konstruaĵon de la urbo - rotondon de Sankta Katarina. La aranĝo estis plensukcesa.

Liba Gabalda, Francujo

### AŬTUNO

Aŭtuno komenciĝas: Fino de septembro. Kelkaj tagoj belaj varmaj. Mi povas sidi ekstere en la arbaro legante aŭ en parkoj en Stockholm. Ĵus nun mi legas libron, kiu fikcie estas verkita de Lorenzo Da Ponte, kiu verkis libretojn por operoj de Mozart. Li rakontas pri sia vivo kaj pri sia kunlaboro kun Mozart. La stilo de la libro estas tre agrabla. Legante mi sentas min vizitanta la 18-an jarcenton. Iun sunan tagon mi sidis kun mia libro apud la Reĝa Biblioteko (nacia biblioteko). La parko apud ĝi ricevis novan statuon de verkisto Hjalmar Söderberg. Li estis famulo en la sveda literaturo komence de la 20-a jarcento. Li promenis tra Stockholm kaj "observis" kiel la verkistoj faris en tiu periodo. En la Reĝa Ĝardeno situas kafejo memore al li. Ĝi ludas gravan rolon en lia romano "Doktoro Glas". En tiu loko situis akvotrinkejo kaj s-ro Glas miksis arsenikon en glason da akvo por la edzo de unu el liaj pacientoj, juna, bela edzino de maljuna pastro. Hjalmar Söderberg apartenis al la "observantoj" de la vivo, de la homoj, de sia urbo Stockholm, kiun li tre ŝatis. Mi nun bone komprenas tion, kiam mi promenas en la sama urbo.

Mi loĝas jam dum tri jaroj apud tiu urbo. Dum miaj ĉirkaŭvagoj mi ekkonis la urbon, ekŝatis ĝiajn akvosurfacojn kaj belajn domfacadojn. Mi trovis kelkajn ejojn, kie mi sidas kaj observas la vivon de la urbo aŭ ĝuas bongustan manĝaĵon. Vidas la rapidan kuradon de homamaso sur Hötorget (pajloplaco) en la centro de la urbo. Multe da fruktoj, legomoj kaj floroj aĉeteblas tie. La homoj rapidas al diversaj farenaĵoj aŭ se la suno iom videblas kaj varmas la homoj ĝuas ĝin sur la ŝtuparo de la blufarbata Koncertejo, kie la 10-an de decembro la Nobelpremio solene estas disdonata.

Mi kelkfoje sidas apud Strömmen (torento) apud la Parlamentejo kaj la Muzeo pri la Mezepoko en urbo Stockholm, kiu tiam aspektis tute alie ol hodiaŭ. Sidi apud rapidfluanta akvo centre en la urbo dum krepuskiĝas varma, somera vespero estas ĝuo. Videblas ĉirkaŭ mi la Reĝa Palaco, la Parlamentejo, la Operejo kaj mia amata ruĝa preĝejo de Jakob. Mi vizitis plurajn el la preĝejoj en Stockholm, kie oni tre ofte povas aŭskulti orgenkoncertojn senkoste; Bach, Beethoven, César Franck, Händel k.a. Dum la aŭtuno okazis pluraj koncertoj sub la nomo "Vox pacis". Tiam mi aŭskultis muzikon de sameoj (joj), tibetanoj, (blovinstrumento) hindoj (tamburoj), ankaŭ kantistoj - dancistoj el diversaj religiaj

tradicioj. Mi sentis la mondon malfermatan alveni en mia urbon.



Kerstin Rohdin, 7/2009 en Parnu Estonujo

En profundaj grotoj sub Skeppsholmen (la porŝipa insuleto) eblas ĉiaŭtune renkonti la argilajn soldatojn el Ĉinio tre bone ekspoziciitajn. Imagu promeni inter "artaĵoj" faritaj de antaŭ 4000-5000 jaroj de la alia flanko de nia globo! La tekstoj tre pedagogie instruas pri la malnova historio kaj vivo de la unua imperiestro de la imperio de Qin. Ekster la Orientazia Muzeo, kiu situas super la grotoj la supervido al Malnova Urbo kaj akvoj plenaj de boatoj brilas en la bela aŭtuna vetero. En la apuda Nacia Muzeo post studo de pluraj ĉambregoj de Arto mi povas en la kafejo ĝui miraklan ŝokoladtorton – preskaŭ same bongustan kiel tiu en la Rusa Muzeo en St Peterburgo. Kun bona gvidisto mi ĉirkaŭpromenis en la Malnova Urbo en la kvartaloj de Bellman nia granda verkisto kaj trubaduro en la 18-a jarcento. Tiam la plej multaj de la enloĝantoj de Stockholm loĝis en la Malnova Urbo ĉirkaŭ 30.000. Ili trinkis dekoble da alkoholo – biero ol nun. Akvo ne trinkeblis pro malpureco. La stratoj malbonodoris de malpura forĵetaĵo. Kia diferenco

dum pli malpli ducent jaroj! Mi trovis malnova restoracio de la 16-a jarcento kun la nomo Magnus Ladulås. – unu el la plej unuaj reĝoj de Svea Regno.

Tie bongustis la en Svedio tipaj malgrandaj frititaj heringoj.

Kiam ankoraŭ la finsomera suno brilis mi vojaĝis per etaj boatoj al urbetoj en la arkipelago – urbetoj kun ruĝaj aŭ flavaj lignaj dometoj. Ĉe la maro plej ofte la dometoj estas flavaj aŭ eble blankaj. En la arbaro ili estas ruĝkoloraj. La vivo trankvilas en la etaj havenoj kaj en la apudmaraj urbetoj. Laŭdire la arkipelago inkluzive la urbo konsistas el 30.000 insuloj kaj insuletoj. Pluraj el ili estas rokoj kaj montetoj. Multaj havenoj kun ŝipoj kaj boatoj, kiuj iras al aliaj havenoj ĉe la Balta Maro; ĉefe al Finnlando kaj Estonio. De la alvenantaĵ ŝipoj vi povas vidi la Artan Ĝardenon « Millesgården » (la Ĝardeno de Milles), kie la statuoj etendiĝas al la ĉielo. Unu el la plej konataj estas « Mano de Dio » granda mano en kiu staras homo. Tiom da ĝuindaj, belaj lokoj inter akvo kaj rokoj troveblas en Stockholm. Mi nur tuŝis kelkajn lokojn, kiujn mi laste vizitis.

Per tiuj bildoj mi volas saluti vin de Stockholm kaj rakonti al vi iom pri miaj travivaĵoj dum la lastaj someraj tagoj. Mi ankaŭ estas tre dankema, ke mi kapablas kaj povas ĝui tiajn belajn tagojn, ke mi kapablas iri kaj vidi.

Fine de septembro 2010

Kerstin Rohdin [k.rohdin@home.se]

### BRITA FUTBALO, AVARAJ ESTROJ

La granda piedpilka fulma reklamo pri Britio, "The Premier League", ŝajne estas pruva ekzemplo de nia profunde malegala socio. La grupo "Reto pro Justa Salajro" (Fair Pay Network - FPN), kampanjas pro programvendistoj, purigistoj kaj manĝaĵlaboristoj ĉe la piedpilk- aŭ futbalklubo, kiuj grandparte ricevas nure minimuman salajron, aŭ eĉ malpli, kvankam ili laboras pro riĉegaj kluboj, kies ludistoj kaj direktoroj ricevas astronomajn salajrojn kaj bonaĵojn.

Pluraj organizoj asertas, ke la leĝa minimuma salajro £5.52 hore ne sufiĉas al fraŭlo por dece vivi. Ili kredas, ke la minimuma salajro devas esti £6.80 hore (£7.45 en Londono). La klubo Chelsea, antaŭe trejnigita de José Mourinho kaj daŭre posedata de rusa bilionulo Roman Abramoviĉ eĉ reklamis manĝaĵajn laborpostenojn je sub la minimuma salajro. Mark Donne, estro de FPN, diris, "Futbalo probable estas unu el niaj plej malegalaj industrioj, ege riĉa sporto servata de homoj kiuj vivas en malriĉeco".

La antaŭa urbestro de Londono, Ken Livingstone, starigis la "Londonan Vivtenan Salajron" de £7.45 hore por ĉiuj laboristoj de Granda Londono.

Lastasemajne la nuna urbestro Boris Johnson skribis al la grandaj kluboj Chelsea, Arsenal, Fulham, West Ham kaj Tottenham, petante ke ili pagu "vivtenan salajron" al ĉiuj laboristoj. Li skribis, "La

futbalaj kluboj de Londono estas integra parto de la socia teksaĵo de la urbego. Iliaj valoroj kaj agado ege influas milionojn da homoj. Mi urĝigas vin doni ekzemplon pagante la Londonan Vivtenan Salajron.”

La Ministro por Sporto, Gerry Sutcliffe ankaŭ subtenas la kampanjon, kredante ke famaj kluboj kiuj portas la nomojn de urboj kaj urbegoj povus doni ekzemplon al la tuta lando. Ĝis nun, neniu klubo konsentis, sed FPN esperas ke Aston Villa estos la unua. La "Premier League" respondis, ke ili pagas laŭ la merkato kaj la leĝo. Estas la respondeco de la registaro pliigi la minimuman salajron. Multaj homoj deziras labori ĉe la kluboj, malgraŭ malgrandaj salajroj. Richard Scudamore, estro de la "Premier League" ricevis bazan salajron £90 000 en la jaro ĝis 31 julio 2007, aldone £410 000 ĉar li negocis TV aranĝojn por la kluboj, kaj £213 000 ricevis lia pensiona fonduso, entute li ricevis £1.2 milionojn. Sir Dave Richards, la nura alia direktoro, pro 3-taga laborsemajno ricevis £261 000. Listo de sumoj ricevitaj de klubaj direktoroj jare montras £2.72 milionoj ĉe Arsenal, ĝis £275 500 ĉe Fulham. Kelkaj el tiuj sumoj inkluzivas monon ricevitan kiam direktoroj forlasis la klubojn. Kelkaj kluboj rifuzis doni tian informon, sed la direktoroj ĉe Middlesbrough kaj Stoke City laŭdirinde laboras volontule, sen salajro kaj sen krompago.

[www.labourstart.org/eo/](http://www.labourstart.org/eo/)

13

## PENSOJ ĈE KOMPUTILO

Mi sidas ĉe komputilo, iom laboretis.



Jakvo Schram, 8/2010 Braŝovo Rumanujo  
Estas strange, mi legis ĉiujn mesaĝojn, respondis al tiuj kiujn mi devas respondi, legis kion mi devis legi, kaj nun...nun mi iom atendas, sen fari ion, ĉar mi scias ke jam estas tiu momento de la tago, kiam mi ne plu devas komenci ion ajn freŝan. Tuj la mondo vekigis en mia regiono kaj mi devas sekvi la fluon de ĉiu tago. Estas Kristnaska datreveno, la tago de la paco. Kia hipokrita afero...paco! Ĉu iu volas ĝin? Kaj se jes, kial ni ne pli forte batalas por havi ĝin? Estas tempo de nova vivo, ho jes! Neniu povas malpermesi ke la naturo revekiĝu post malonga ripozeto, eĉ ne dogmoj kaj rakontoj malveraj. Kvankam vintro nur komenciĝis, la naturo jam puŝas ĉe pordo de estonta printempo. Ĉiam la mondo turniĝas, kaj se iam ĝi decidas halti, estas fino por ĉio kaj ĉiu. Kristnasko, kio vi estas? Ĉu festotago? Tago de espero aŭ melankolio pri perdita jaro? La

14

bonfaruloj manĝas kaj diboĉas kaj la mizeruloj serĉas ŝirmilon ie sub ponto ĉe aliaj senhavuloj! Vi ne feliĉigas min, Kristnasko, sed metas min en letargio kaj melankolio. Mi volas esti feliĉa, sed ne scias kial. Mi volas partopreni, sed tro pensas pri tiuj, kiuj malhavas, pri tiuj, kiuj troviĝas en fremdaj landoj, kie ili devas mortpafi nekonatulojn, laŭ preteksto ke ili venis por savi la pacon. Mi vere malamas vin, Kristnaskon, kun viaj belaj promesoj pri paco kaj bono, kiujn vi neniam efektiviĝas. Mi malamas viajn mensogojn. Donu al mi la ĉiutagan tagon, dum kiu mi povas sendi mian amon al tiuj, kiuj meritas, kiuj akceptas kaj deziras esti amataj. Mi ne bezonas festotagojn, kiam hipokrituloj festas kaj ĝojas. Donu la ĉiutagan tagon kaj mi estos feliĉa en brakoj de mia amatino. Mi ne bezonas festotagojn, la ĉiutaga tago estas plej kara por mi, ĉar tiam mi povas esti libera de ĉiuj hipokritecoj.

Jakvo Schram, Antverpeno, Belgujo,  
27a de Decembro 2009

## ZAMENHOFA FESTO

Grupeto de niaj kunklubanoj de EBG deziras kunveturi aŭtomobile, ek de la **17h30 de merkredo la 15an de Decembro**, por partopreni la Zamenhofan feston en Villeneuve-d'Ascq apud Lille, Norda Francujo, respondante al invito de Katja el Lille. Kiu interesiĝas bonvolu kontakti

**Laurent Loisse** < [laur1150@yahoo.fr](mailto:laur1150@yahoo.fr) >. Jen inviton :  
*Nia klubo Lille-Villeneuve-Espéranto ŝatus inviti vin okaze de la Zamenhofa festo, merkredon la 15an de decembro, je la 18h30 vespere. Ni antaŭvidas simplan renkontiĝon, ion por manĝeti kaj trinki, kantojn kaj rakontojn, kaj ŝatus ke tiu renkontiĝo estu ĝoja festo pri amikeco pere de Esperanto. Ni atendas vin en la salono Masquelier: Salle Masquelier, 167, Rue Jules Guesde, 59650, Villeneuve-d'Ascq. Se vi deziras kanti, ion legi, muziki, vi estos bonvenaj. Antaŭproponu tion por faciligi la organizadon. Por ke ni havu ideon pri la nombro de partoprenantoj, ni ŝatus ke vi respondu rapide (plej malfrue antaŭ la fino de novembro). Sendu mesaĝon aŭ telefonu: [boencathie@hotmail.fr](mailto:boencathie@hotmail.fr) (03 20 92 31 36)*

Katja, 24a de Novembro 2010,  
Klubo Lille-Villeneuve-Espéranto

## CAFÉ ESPÉRANTO

**Kio estas?** - Ne estas loko, sed rendezuo. Ĉiun duan vendredon de ĉiu monato, samideanoj kunvenas en trinkejo por havi agrablan vesperon.

**Por kiu?** - Komencantoj, spertuloj aŭ scivolemuloj kiuj ankoraŭ ne konas la lingvon : ĉiuj estas bonvenaj.

**Sed kie en Bruselo?** - La loko ŝanĝiĝas laŭ la proponoj.

<http://cafe-eo-bxl.weebly.com/>

Germain Pirlot, Oostende, 22a de Novembro 2010

## KIOM DA ESPERANTISTOJ ?

Intereta peticio. La celo estas kalkuli kiom da homoj parolas Esperanton en la mondo, musklakante intere sekve: "*Mi komprenas kaj tial subskribas la jenan tekston. Bonvolu kalkuli min inter la Esperanto-parolantoj!*"

Retejo : <http://www.thepetitionsite.com/1/esperanto-parolantoj-en-la-mundo/>

De multaj jaroj oni prave demandas sin, kiom da Esperanto-parolantoj estas en la mondo. La respondoj estas diversaj: dekduo, sescent, kelkmiroj, unu-du-kvar-ses milionoj. Oni foje aŭdacas. La celo de tiu ĉi peticio estas kalkuli, kvantigi, elnombri la tutmondan esperantistaron per la iloj, kiujn la nuntempa teknologio disponigas al ni. Temas pri projekto ambicia, certe, tamen ne utopiista en la interreta hodiaŭa epoko.

Informu pri tiu ĉi peticio la Esperanto-parolantojn, kiujn vi konas: membrojn de via loka grupo, korespondantojn, gastigintojn, geamikojn, cxiujn ajn. Inkluzive de homoj, kiujn vi renkontis antaŭ pluraj jaroj. Informu ilin laŭeble per retpoŝto, se ili uzas ĝin, sed, se ili estas maljunaj aŭ loĝas en lando/kontinento, en kiu la aliro al Interreto ne estas facila, informu ilin persone, per telefono, fakso, letero, mesaĝo, kurierkolombo (kial ne?). Ĉiuj verŝajne havas filon, fraton, nevon, nepon, amikon, kolegon, kiu povos ilin helpi subskribi nian popolan nombradon. Aŭ vi mem helpu ilin.



Ne pensu, ke ne estas eble kvantigi la esperantistaron: ĉiu sciigu la peticion al siajn Esperanto-parolantajn kontaktulojn. Kaj, se iuj ne sukcesos aliĝi la popolnombradon, ni havos almenaŭ minimumam taksadon (5000, 10000, 50000...) pri tiuj, kiuj parolas Esperanton kaj estas aktivaj en Interreto, kio estus same rimarkinda.

Pludonu la informon kaj... vivu Esperanto! Por pliaj informoj pri la iniciativo, sendu retmesaĝon al: [esperob79@gmail.com](mailto:esperob79@gmail.com)

Interete, 23/11/2010

## CWIK OPINIAS

Pri intereta peticio koncerne kiom da esperantistoj: Mi ankaŭ ofte ricevis tiun demandon, specife venante de politikistoj kaj jurnalistoj! Kaj miaj respondo ĉiam estas: Tiu demando estas same kiel: "Kiom da ĉaĥ-ludantoj ekzistas en la mondo?!" Neniu scias kaj neniu povas ja doni realan respondon!

Do, por reklami kaj doni ideon al ne-esperantista mondo pri la

16

nombro de esperantistoj taŭgus uzadon de "Google map" kaj helpe de landaj asocioj, taŭgus montradon de pasporta servo, de UEA, de jarlibro, kun malsimilaj simboloj, ĉiun ejon en kiu ekzistas esperantaj organizoj, respresentantoj, eldonejoj, kluboj, aktivecoj au loĝ-eblecoj. Tiamaniere ne esperantistoj, ĵurnalistoj kaj politikistoj povus ricevi ideon pri la disvastigo kaj diverseco en ĉiu lando, kontinento kaj sur la tuta mondo!

Tiu ideo jam estis proponita dum la unua Universala Kongreso en Beijing en malgranda rondo, sed neniu realigis aŭ organizis la creadon de tia mond- kaj land-skala mapo de esperantaj aktivecoj en la mondo. Hodiaŭ, kun la elektronikaj eblecoj kaj malcentralig-ebleco de la laboro, la realigo de tiu ideo estas pli facile atingebla! Ekzistas en nia movado komputil-spertuloj, kiuj konas kaj havas la programojn por facile enmeti la diversajn esperantistajn adresojn kaj lokojn en komuna "Google map"!

Do, kie estas la esperantaj komputilaj spertuloj, kiuj povas organizi kaj kunordigi tiun idealan kaj reklaman taskon por la Esperanta movado?

Mi estas preta doni miajn informojn pri ĉio kio jam estis diskutita kaj mi estas ankaŭ preta kunlabori en la realigo de tiu inda tasko por la Esperanta movado! "Korajn salutojn!"

Michael Cwik, Bruselo, cwikbe@me.com, 24/11/2010

## SUPERRAPIDA TRAJNO

Malfermiĝis la superrapida fervojo Ŝanhajo-Hangzhouo.



La 26-an de oktobro je la 9-a horo oficiale malfermiĝis la superrapida fervojo Ŝanhajo-Hangzhouo, kun la longeco de 202 kilometroj kaj la rapideco de 350 kilometroj en unu horo. Post la malfermiĝo de la fervojo, la transporta povo inter la du urboj ege grandiĝos kaj la vetura tempo tre mallongiĝos. Jam sufiĉas nur 45 minutoj por vojaĝi ek de Ŝanhajo al Hangzhouo.

La superrapida trajno estas la nova generacia motorvagonaro kaj estas la plej rapida en la kurado kaj la plej antaŭeca en la tekniko tra la mondo. La 28-an de septembro en la prova veturado ĝi kreis la rekordon de 416,6 kilometroj en unu horo. Sekve de la malfermiĝo de la superrapida fervojo Ŝanhajo-Hangzhouo, la totala longeco de la ĉina superrapida fervojo atingis eĉ 7 431 kilometrojn.

clara\_bracke@yahoo.com  
leopold.patek@esperanto.at  
ifef@yahoogroups.fr

<http://esperanto.cri.cn/581/2010/10/26/1s117537.htm>



## Protokolo de la ĝenerala jarkunsido : 10 novembro 2009

### **1. Bonvenigo, konstato de kvorumo.**

**Estraranoj partoprenis:** Angelos Tsirimokos, prezidanto – Jan Amadori, kasisto – Muriel Petit, sekretario – Georgia Henningsen – Michael Cwik – José Pinto de Sousa – Paulo Branco, redaktoro de Aktuala

**Aliaj Efektivaj Membroj partoprenis:** Francine Sperber, Eric Baert.

**Petis senkulpigon:** Hélène Falk-Bracke, Françoise Pellegrin, Barbara Poterucha

**EBG-Membroj:** Vladimira Chvatalova, Nicolas de Buyl, Hugues De Keyzer, Yves De Keyzer, André Dyon, Laurent Loisse

**Pri mandatoj:** Françoise Pellegrin donis mandaton al Jan Amadori kaj Barbara Poterucha al Angelos Tsirimokos

**Kvorumo atingita.**

### **2. Aprobo de pasintjara protokolo.**

**Aprobata** kiel ĝi aperis en «Aktuala», decembre 2009

### **3. Raporto pri la pasintjara agado kaj nuna stato de la Grupo:**

**3.1. Financa, fare de la kasisto:** Ci-jare, estas profito (6.049,22 €) sed nur dank' al la fondaĵo Ernst (sen ĝi estus deficiton de 200,78 €). La Zamenhof-festo ne havis deficiton kaj havigis eĉ profiton de 421,28 €. Gratulon al Françoise. Aliflanke, ni pagis iomete pli por "Aktuala". Kotizo restu sensŝanĝa, baze je 10 €. Pli da detaloj en paĝo disdonita de la kasisto.

Ni devos meti sur profitdonan konton la monon kiu nun sidas en la poŝta konto. Ekzamenindaj estas la eblecoj de banko Triodos. La kasisto esploros tion kaj decido estos prenita de estraro dum la jaro.

### **3.2. Morala, fare de la prezidanto:**

-Nombro de membroj stabilas ĉirkaŭ 92 membroj. (iom malkreskis sed ne tro draste). Eble ni devos pli forte rememorigi nekotizintojn. Ni funkcias, ni tenas la flamon viva.

-Partoprenas homoj pli junaj, i.a. kiel kasisto kaj sekretario.

-Prezidanto akceptas provizore plu teni la postenon. Sed en 4 jaroj, ni nepre devos trovi novan.

-Niaj kursoj plu funkcias. Unua nivelo: ĉiusemajne kun Françoise Pellegrin. Pasint-jare, 14 lernantoj partoprenis ĝis la fino de la jaro en la unua grado, kaj estis 8 lernantoj en la dua grado. Estis ankaŭ kunvenoj pri diversaj temoj (inter kiuj, brila serio pri astronomio). Ĉi-jare, estas 5 kiuj partoprenas la unuan kurson. Dua nivelo : la parteprenantoj kune laboras por prepari kaj gvidi la kurson. Ili estas inter 5 kaj 10 ĉiun merkredon.

-Dum la akademia jaro: Aktuala aperis 12-foje (ĉiumonate). Ĝi estis (kaj plu estas) sendata poŝte kaj ankaŭ aperigata sur la reto. Dankon al la redaktoro, Paulo Branco!

-Okazis sukcesa Zamenhoffesto kun temo «Vivu Kubo!» la 12an de decembro.

-Okazis du komunaj festoj lernojarfinaj en junio, unu dimanĉon ĉe Ges-roj De Monty en Dilbeek kaj unu vesperon en Brusela restoracio.

### **4. Aprobo de la kontoj kaj malŝarĝo de la nuna estraro**

Jes, kondiĉe ke Eric Baert trovos nenion malĝustan en la kontoj.

### **5. Sinprezento de la kandidatoj por la estraraj postenoj kaj kiel efektivaj membroj kaj elekto de nova estraro.**

Nicolas de Buyl, Hugues De Keyzer, Laurent Loisse akceptitaj kiel efektivaj membroj

Nicolas de Buyl akceptita en la estraron. Ceteraj estraranoj reelektitaj.

**Do la nova estraro konsistas el jenaj membroj:** La kernkomitato:

Prezidanto: Angelos Tsirimokos; Kasisto: Jan Amadori; Sekretario: Muriel Petit. Kromaj membroj: Georgia Henningsen, José Pinto de Sousa, Michael Cwik, Paulo Branco, Nicolas de Buyl (nova)

**Novaj efektivaj membroj :** Nicolas de Buyl, Hugues De Keyzer, Laurent Loisse

### **6. Planoj kaj proponoj por la jam komenciĝinta lernojar**

**6.1. Zamenhoffesto :** Ne okazos ĉi-jare. Françoise Pellegrin ne plu volas esti sola por prepari ĝin. Eble plu pripensi la eblecon ke nacia Zamenhof-festo okazu alterne en Bruselo, Valonio, Flandrio, eventuale ankaŭ en la germanlingvaj kantonoj - por ŝpari energion kaj kunigi ĉiujn esperantistojn el Belgio.

**6.2. Paulo Branco estas nova delegito ĉe UEA** (oficiale por Etterbeek).

**6.3. Ebleco lui projekciilon privatacele.** Vidu la informojn en la ŝranko (5€/semajno). Rezervado utilas.

**6.4. Nova aranĝo de nia tro longe neglektata retpaĝaro** dank'al Nicolas, Hugues kaj Laurent. Nova retadreso: [www.esperantobruselo.org](http://www.esperantobruselo.org) . 25 Gb da loko. Tio kostos 28 € jare. Dinamika retejo kun novaj artikoloj, facila ebleco ŝanĝi enhavon. Ĝi jam funkcias en provizora formo; eblas ricevi konton por aldonadi informojn. Se temas pri filmoj, pli bone meti sur youtube aŭ vimeo kaj nur ligojn sur la retpaĝaro mem.

**6.5.** La grupo havas monon, do estas ebleco por subteni **budojn, afiŝojn**, kaj aliajn projektojn. Bonvolemluloj bonvenaj.

**6.6.** Eble krei **neŭtralan eŭropan mapon** (kun nomoj en la lingvo de la lando). Michael Cwik esploros la ideon.



Asemblea Jarkunveno de Esperantista Brusela Grupo, 10/11/2010



140 partoprenantoj en la 22a Nordfranca E-Rendevuo, 13-14/11/2010 Stella-Plage




Prelego de Michèle Viliers kaj Hubert de Meyere pri belga historio, 17/11/2010



Prelego de Barbara Poterucha pri sano, kursoj enkonduka kaj progresiga, 24/11/2010

## JEAN MARIE NICOLAS DE BUYL



Novelektita estrarano de EBG